esperanto.es

# La Bitbulteno

NUMERO: 30
2016-09-25

**Saluton !**

**He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la Federación Española de Esperanto.**

**Jen nova numero de la Bitbulteno de Hispana Esperanto-Federacio.**

## COLOQUIO EN EL DÍA EUROPEO DE LAS LENGUAS

El día 26 de septiembre se celebra todos los años desde el 2001 el Día Europeo de las Lenguas, bajo el patrocinio del Consejo de Europa. Es una ocasión de celebrar la diversidad lingüística en Europa y el resto del mundo, mediante la organización de actividades en torno a los idiomas y el multilingüismo.

Como ya hicimos el año pasado, la Federación Española de Esperanto se une a la celebración. Este año hemos programado un Coloquio sobre el tema «**La política lingüística en las instituciones europeas tras el 'Brexit'**», que tendrá lugar ese lunes, 26 de septiembre del 2016, a las 19 horas, en la sede de la Federación Española de Esperanto (calle Rodríguez San Pedro, 13, 3, Madrid, metro San Bernardo)

Los ponentes que introducirán el tema serán: José Antonio del Barrio, presidente de la Federación Española de Esperanto, Ricardo Albert Reyna, profesor de la Universidad Autónoma de Madrid y traductor, y Manuel Pancorbo Castro, profesor de la UNED y director de la Fundación Esperanto. Seguirá un debate entre los asistentes a la jornada.

Más información en http://www.esperanto.es/hef/index.php/42-noticias-espanol/articulo/321-coloquio-en-el-dia-europeo-de-las-lenguas.

## KOLOKVO OKAZE DE LA EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

La 26an de septembro, ĉiujare post 2001, laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo, oni celebras la Eŭropan Tagon de Lingvoj. Ĝi estas tago por festi la eŭropan plurlingvecon kaj stimuli lingvolernadon.

Kiel pasintjare, Hispana Esperanto-Federacio aliĝos al la celebrado. Ĉijare ni programis kolokvon pri la temo **«La lingva politiko en la eŭropaj institucioj post la 'Briteliro'»**, por la lundo, 26-a de septembro 2016, je la 19 horo, en la sidejo de HEF en Madrido (strato Rodríguez San Pedro, 13, 3, metrostacio San Bernardo)

La enkondukantoj estos: José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Ricardo Albert Reyna, profesoro de la Aŭtonoma Universitato de Madrido kaj tradukisto, kaj Manuel Pancorbo Castro, profesoro de la Distanca Universitato UNED kaj direktoro de Fundación Esperanto. Post la enkonduko oni malfermos debaton inter la ĉeestantoj.

Pli da informoj: http://www.esperanto.es/hef/index.php/42-noticias-espanol/articulo/321-coloquio-en-el-dia-europeo-de-las-lenguas.



## NUEVOS EVENTOS PARA EL OTOÑO

Tras la gran cantidad de congresos y encuentros relacionados con el esperanto que han tenido lugar este verano, se anuncian varios eventos nuevos en este otoño en nuestro país.

El más cercano será la 24 Semana Internacional de la Cultura y el Turismo, que este año tendrá lugar en Cambrils (provincia Tarragona) entre el 1 y el 8 de octubre. En el programa están previstas conferencias de Rodica Todor, Gian Carlo Fighiera, Peter Zilvar, Rudolf Fischer, Zofia Korody, Aldis Bušs, entre otros. Se procederá a la entrega de una nueva edición del Premio Ada Fighiera-Sikorska. También tendrán lugar debates, actuaciones folklóricas, cursos y otras actividades. Están previstas excursiones al Parque Samá en Cambrils, Morella y Peñíscola. Para apuntarse o recibir información se puede contactar con Luis Serrano en la dirección de correo luis_serrano@ya.com

La Unión Andaluza de Esperanto (AEU) organiza el 20 Congreso Andaluz de Esperanto entre el 29 de octubre y el 1 de noviembre en Antequera (provincia de Málaga). El tema principal del congreso es “Esperanto y Naturaleza: Cielo y Tierra”, con el objetivo de aplicar la lengua internacional esperanto al estudio de las ciencias naturales en un marco tan adecuado como el de Antequera. Su sede principal será un bello salón en el Museo Municipal, donde se disfrutará de conferencias, literatura, presentación de nuevos libros, etc. Se visitarán los monumentos de la ciudad, así como los Dólmenes, declarados como Patrimonio de la Humanidad, el paraje de “El Torcal” y el famoso “Caminito del Rey”. Más informaciones: https://andaluciaesperanto.wordpress.com/

También a finales de octubre, entre el 28 y el 30, la Asociación Catalana de Esperanto organiza su *Encuentro Internacionalista* en Figueres. Se podrá disfrutar de conferencias y actividades muy variadas, así como de la actuación musical del cantante occitano JoMo. Más informaciones: http://esperanto.cat/ir2016/

## NOVAJ AŬTUNAJ EVENTOJ EN ESPERANTUJO

Post la amaso da kongresoj kaj renkontiĝoj esperantistaj dum la pasinta somero, pluraj novaj eventoj estas anoncitaj por tiu ĉi aŭtuno en nia lando.

La plej proksima estas la 24-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo, kiu okazos ekde la 1-a ĝis la 8-a de oktobro en urbo Cambrils (provinco Taragono, Katalunio). En la programo oni antaŭvidas prelegojn de Rodica Todor, Gian Carlo Fighiera, Peter Zilvar, Rudolf Fischer, Zofia Korody, Aldis Bušs, inter aliaj. Oni aljuĝos novan eldonon de la Premio Ada Fighiera-Sikorska. Okazos ankaŭ debatoj, folkloraj vesperoj, kursoj kaj aliaj aktivadoj. Ekskursoj estas antaŭviditaj al Parko Samá en Cambrils, al Morella kaj Peñíscola. Por aliĝoj kaj pliaj informoj, kontaktu kun Luis Serrano ĉe luis_serrano@ya.com

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo okazigos sian 20-an Kongreson de la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro en la urbo Antekero (Antequera, provinco Malago). La ĉefa temo de la kongreso estas “Esperanto kaj Naturo: Ĉielo kaj Tero”, cele al aplikado de la internacia lingvo al la studo de la naturaj sciencoj en tia taŭga kadro kia Antekero. Ĝi disvolviĝos en luksa kaj bela salono ene de la Municipa Muzeo de la urbo, kie oni ĝuos prelegojn, deklamadon de poemoj, prezenton de novaj libroj, ludoj, ktp. Oni vizitos la monumentan urbon mem, kies megalitaj dolmenoj estis agnoskitaj kiel Heredan Havaĵon de la Homaro, kaj la naturajn belaĵojn “El Torcal” kaj la mondkonatan vojon “Caminito del Rey”. Pliajn informojn: https://andaluciaesperanto.wordpress.com/

Ankaŭ fine de oktobro, inter la 28-a kaj 30-a, Kataluna Esperanto-Asocio organizas sian *Internaciisman Renkontiĝon* en Figueres (nordorienta Katalunio). Oni povos ĝui tre diversajn prelegojn, kaj ankaŭ la muzikan partoprenon de JoMo. Pliajn informojn ĉe http://esperanto.cat/ir2016/

20a Andaluzia Kongreso de ESPERANTO
Antekero, 29a oktobro / 1a novembro 2016

## ESPERANTO EN FESTIVAL PARA SENIORS

La Asociación de Seniors Internacional (ASIAL) organiza entre el 14 y el 22 de octubre en Almería el *Seniors International Festival*, un encuentro para personas de más de 50 años, entre cuyas actividades se ha incluido al esperanto como uno de los elementos del programa cultural. Se trata de un Festival eminentemente lúdico y turístico, con una serie de actividades deportivas y culturales, algunas de ellas organizadas bajo el tipo de *Olimpiadas Seniors*. Entre éstas se organizará un curso de esperanto con un concurso al final, que serán conducidos por el conocido esperantista norteamericano Dennis Keefe.

Los organizadores han solicitado ayuda en la difusión a la Federación Española de Esperanto y ofrecen una rebaja en la inscripción a las personas que se informen a través de los medios esperantistas. Para ello, hay que introducir en la inscripción un código especial: 160064. Para más detalles, consultar nuestra página web.

## ESPERANTO EN FESTIVALO POR PLIAĜULOJ

Ekstera asocio por *pliaĝuloj* (emeritoj kaj ĝenerale homoj super 50 jaroj) organizas inter la 14-a kaj 22-a de oktobro eventon en Almerio (orienta urbo de Andaluzio, ĉe la mediteraneo), en kiu oni inkludos Esperanton kiel unu el la eroj de la distra programo. La Festivalo estos eminente distra kaj turisma, kun serio da aktivaĵoj sportaj kaj kulturaj, kelkaj el ili sub la formo de konkurso, kvazaŭ olimpikaj ludoj. Inter ili oni organizos rapidan kurson de Esperanto, kun konkurso ĉe la fino, kiujn gvidos la konata aktivulo Dennis Keefe.

La organizantoj petis helpon por disvastigo al Hispana Esperanto-Federacio, kaj eĉ proponis rabaton por homoj kiuj venos pere de nia informado en la esperanta medio. Por tio, ĉe la enskribiĝo, oni devis enmeti specifan kodon por speciala prezo: 160064. Por pliaj detaloj, vizitu nian retejon.




## DON QUIJOTE PRESENTADO EN CENTROEUROPA

Como ya informamos en nuestro anterior Bitbulteno, el pasado 1 de julio, en Herrera del Duque, en el marco del 75 Congreso Español de Esperanto, se presentó la edición digital de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha", la traducción completa al esperanto de la obra de Miguel de Cervantes, editada por la Federación Española de Esperanto.

Podemos confirmar ahora que el proyecto ha sido incluido dentro del programa oficial de conmemoración de la Comisión Estatal de Conmemoración del IV Centenario de la muerte de Miguel de Cervantes.

El libro no sólo es accesible en formato web, sino que, como indicamos en nuestro anterior Bitbulteno, los interesados pueden adquirir unas tarjetas con conexión USB, con el archivo del libro y con unas portadas muy bellas diseñadas para la ocasión. Las tarjetas pueden

## DON QUIJOTE PREZENTATA EN CENTRA EŬROPO

Kiel ni informis en pasinta Bitbulteno, la 1an de julio, en Herrera del Duque, en la kadro de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, estis prezentita la bita eldono de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha", la kompleta traduko al Esperanto de la verko de Miguel de Cervantes eldonita de Hispana Esperanto-Federacio.

Ni povas konfirmi nun ke la projekto estis selektita kiel unu el la eroj de la oficiala programo de la Ŝtata Komisiono por la kunmemoro de la 400 datreveno de la morto de Miguel de Cervantes.

La verko estas alirebla ne nur en reta formato, sed ankaŭ, kiel ni informis en pasinta Bitbulteno, la interesatoj povas akiri tre oportunajn kartojn kun konekto USB, enhavantajn la dosieron de la libro, kaj kun tre belaj kovriloj. La kartojn eblas aĉeti nun en la

comprarse ahora también por medio del servicio de venta de libros de la Asociación Universal de Esperanto.


El libro y las tarjetas fueron dados a conocer al público esperantista internacional durante la jornada de presentación de nuevos libros en el Congreso Universal de Esperanto que tuvo lugar a finales de julio en la ciudad eslovaca de Nitra.

Así mismo, durante el Festival ARKONES, una de las más intensas manifestaciones de la cultura relacionada con el esperanto que se está celebrando este fin de semana en Poznan (Polonia) está anunciada una presentación de la edición electrónica de "Don Quijote de La Mancha", a cargo de Félix Jiménez Lobo, hasta hace unas semanas secretario de la Federación.

Libroservo de Universala Esperanto-Asocio.

La libro-dosiero kaj la kartoj estis konigitaj al la internacia esperantista publiko dum la programero pri novaj eldonoj de la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Nitro (Slovakio) fine de julio.

Krome, dum la Festivalo "Artaj Konfrontoj en Esperanto" (ARKONES) kiu disvolviĝas dum tiu ĉi semajnfono en Poznano (Pollando), la antaŭa sekretario de HEF Félix Jiménez Lobo prelegis pri "Don Quijote de La Mancha" kaj prezentis la novan bitan eldonon en Esperanto.




**PREMIOS EN EL CONGRESO INTERNACIONAL DE ESPERANTO**


Durante el Congreso Universal de Esperanto en Nitra (Eslovaquia) se anunciaron los premios que cada dos años ofrece la Fundación Antoni Grabowski, para reconocer actividades dentro del mundo del esperanto. Este año, el segundo premio lo ha recibido la Federación Española de Esperanto, por su biblioteca electrónica, la *"Bitoteko"*, donde (citamos del comunicado oficial) es posible acceder a destacadas obras de la literatura, entre las cuales últimamente debe mencionarse la edición electrónica de la traducción de "Don Quijote de La Mancha".

Además, durante el mismo Congreso se anunciaron los resultados de los Concursos Literarios de la Asociación Universal de Esperanto del 2016. Una buena colección vino a España: en concreto, el primer premio de la rama Poesía, fue adjudicado a Antonio Valén, por "Paralele". En el apartado ensayo el segundo premio fue para Jorge Camacho Cordón, por "La vartisto de vortoj". En ese mismo apartado se adjudicaron el tercer premio y una mención especial a Suso Moinhos Pardavila, aunque éste renunció posteriormente al premio. El libro con los textos premiados ya se ha editado con el título "Belarta rikolto 2016"

**PREMIOJ DUM LA UNIVERSALA KONGRESO**

Dum la Universala Kongreso en Nitro (Slovakio) estis anoncitaj la premioj kiujn ĉiun duan jaron donas la Fondaĵo Antoni Grabowski, por elstaraj agadoj en Esperantujo. Ĉijare la duan premion (300 US-dolarojn) ricevis Hispana Esperanto-Federacio pro (ni citas el la komuniko de UEA) «*Bitoteko*, sia elektronika biblioteko, per kiu ekde 2013 elstaraj verkoj estas facile kaj senkoste alirebligataj al la publiko – laste, okaze de la 400-a datreveno de la morto de Miguel Cervantes, Donkiĥoto en la traduko de Fernando de Diego.» La premion ricevis surloke la vicprezidanto de HEF, Ángel Arquillos.

Krome, dum la sama Kongreso estis anoncitaj la rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA, kaj ĉijare bona kolekto venis al Hispanio. Konkrete, la unuan premion en la branĉo Poezio ricevis Antonio Valén, pro "Paralele". En la branĉo Eseo, la duan premion ricevis Jorge Camacho Cordón, pro "La vartisto de vortoj". En tiu sama branĉo ricevis trian premion kaj honoran mencion Suso Moinhos Pardavila, kvankam tiu ĉi poste rezignis la premiojn. Jam eblas aĉeti la libron kun la premiitaj verkoj, "Belarta rikolto 2016".




## EXPOSICIÓN SOBRE ESPERANTISTA HISTÓRICO

La Biblioteca de Aragón en Zaragoza acoge una exposición dedicada a Francisco Azorín. Organizada por la Fundación Amantes de Teruel y ya mostrada antes en esta provincia, su título es "De vuelta a casa. Francisco Azorín, el turolense errante", y podrá verse hasta finales del mes de octubre.

La muestra está dedicada a una de las figuras turolenses más destacadas del exilio republicano a la vez que desconocidas en Aragón, el arquitecto, político, escritor, profesor y esperantista Francisco Azorín Izquierdo, y llega ahora a Zaragoza con motivo de haberse cumplido el 40 aniversario del fallecimiento de Azorín, y coincidiendo con el 80 aniversario del estallido de la guerra civil española.

A la inauguración asistieron familiares directos de Francisco Azorín, que viajaron a Zaragoza desde Méjico y otros lugares para la ocasión, así como los responsables de los grupos esperantistas “Frateco” de Zaragoza y “Liberanimo” de Teruel.

## EKSPOZICIO PRI HISTORIA ESPERANTISTO

La Biblioteca de Aragón en Zaragozo inaŭguris la 16an de septembro ekspozicion pri la historia esperantista arĥitekto Francisco Azorín. Organizata de la Fondaĵo Amantes de Teruel kaj jam antaŭe montrita en Teruelo, ĝia titolo estas "Revene hejme, Francisco Azorín, la vaganta teruelano", kaj ĝi povas esti vizitata ĝis la fino de oktobro.

La ekspozicio estas dediĉata al unu el la terueldevenaj figuroj plej elstaraj el la respublikana ekzilo, samtempe malmulte konata en Aragono, la arĥitekto, politikisto, profesoro, verkisto kaj esperantisto Francisco Azorín Izquierdo.

La inaŭguron ĉeestis familianoj de Francisco Azorín, vojaĝintaj el Meksikio kaj aliloke por la okazo, kaj la respondeculoj de la esperantistaj asocioj “Frateco” de Zaragozo kaj “Liberanimo” de Teruelo.




## ESPERANTO EN LA PRENSA

A mediados de agosto el suplemento dominical “El País Semanal” dedicó una página entera al Museo de Esperanto de Subirats. Puede leerse el artículo completo en este enlace.

## ESPERANTO EN GAZETARO

Meze de aŭgusto la plej disvastigata dimanĉa ĵurnalsuplemento “El País Semanal” dediĉis unu tutan paĝon al la Esperanto-Muzeo Subirats. Oni povas ĝin legi kompleta en tiu ĉi ligilo.

Con ocasión del fallecimiento de Reinhard Selten, que fue galardonado en 1994 con el Premio de Economía en honor de Alfred Nobel, diversos medios se han hecho eco de su relación con el esperanto. Puede leerse más información en nuestra web.

Okaze de la forpaso de Reinhard Selten, kiu ricevis en 1994 la Premion pri Ekonomiko honore al Alfred Nobel, diversaj ĵurnaloj menciis lian rilaton a Esperanto. Pri tio eblas legi pli detale en nia retejo.


DOCUMENTOS · EL PULSO

Memoria del esperanto

Un pueblo catalán de 500 habitantes atesora uno de los mejores museos del mundo dedicados a la llamada lengua universal.

JORGE GARCÍA LÓPEZ

Ludwik Lejzer Zamenhof, el oftalmólogo polaco que inventó el esperanto a finales del siglo XIX.

EN LA COMARCA del Alto Penedés, en la provincia de Barcelona, se puede visitar el único museo que existe en España dedicado al esperanto, la lengua que surgió en 1887 con vocación de convertirse en idioma universal y que hoy hablan un millón de personas en todo el mundo, según las estimaciones de la Federación Española de Esperanto (FEE).

Está en Sant Pau d'Ordal, un pueblo de poco más de 500 habitantes incrustado entre laderas pobladas de viñedos. A propósito de su inauguración, en 1974, el Ayuntamiento rebautizó la calle donde se encuentra con el nombre de L. L. Zamenhof, en honor al oftalmólogo polaco que inventó esta lengua, dotada de una gramática muy sencilla y que extrae su vocabulario de diversos idiomas, desde el latín al japonés.

El museo atesora una de las bibliotecas más completas del mundo, según la FEE, y acoge un número ingente de platos, sellos, monedas, cerillas o juegos de cartas en las que aparece el símbolo de este movimiento: una estrella de cinco puntas –una por cada continente– y de color verde, en alusión al significado de la palabra esperanto: el que trae esperanza.

En un espacio discreto se encuentra la fotografía del hombre que reunió esta descomunal colección: Lluís Hernández. Nacido en Barcelona, se instaló en Sant Pau d'Ordal en 1945 para regentar una farmacia y, gracias a un vecino de la comarca, entró en contacto con el esperanto a finales de los cincuenta.

No se puede decir que ese fuese su momento álgido. En una época de confrontación, una lengua que defendía un ideal supranacional de igualdad y tolerancia no era bien vista por muchos Estados. Los regímenes autoritarios de Alemania y Rusia prohibieron su divulgación. También fue marginada durante la mayor parte de la dictadura franquista. Antes, España había sido uno de los países en los que más pronto prendió el interés por el esperanto. En 1898, solo dos años después de que Zamenhof publicara el primer libro sobre esta lengua, Francisco Pi y Margall –entonces expresidente de la Primera República– le dedicaba un artículo en el diario *El Nuevo Régimen*.

En 1963 la Universidad de La Laguna creó la primera cátedra de esperanto del mundo. Al mismo tiempo que la lengua ganaba fuerza, Hernández iba recolectando objetos relacionados con ella.

Se convirtió en una regla no escrita que, al morir un esperantista, su familia donara a Hernández algunos objetos de su colección privada. Teresa, su esposa, cuenta cómo vivieron literalmente sepultados bajo miles de pesados tomos durante varios años, hasta que ella misma le instó a que construyera un lugar donde almacenarlo todo. Y así surgió la idea del Museo del Esperanto. Durante los siguientes 18 años, Hernández reunió alrededor de 8.000 libros, 15.000 boletines y revistas y 500 utensilios de todo tipo.

Su hijo, Rafael, mantiene intacto el museo, pero, como él mismo confiesa, este se encuentra congelado desde la muerte de su padre, en 2002. Pese a ello, sigue siendo un lugar de obligado peregrinaje para los poco más de 400 afiliados a asociaciones esperantistas que hay hoy en España, casi tantos como habitantes tiene Sant Pau d'Ordal. –EPS

## DISCO “ESPERANTO”

Cronómetrobudú es una banda española, nacida en Burgos y con gran éxito en México, que combina ritmos de rock con tonos de estilos muy diferentes, que acaba de editar su sexto disco con el nombre “Esperanto”. Para este disco solicitó colaboración de los esperantistas españoles, y fruto de la misma ha sido la introducción de motivos relacionados con nuestra lengua. El más destacado es la participación de Miguel Fernández en una de las piezas, declamando el poema “Ho, mia kor’”, uno de los clásicos en nuestra lengua.

El disco ya ha sido presentado en México, y en breve lo hará en España: el día 1 de octubre en la sala “Hangar” de Burgos, y el 5 de noviembre en “Moby Dick” de Madrid. A la primera de ellas la banda ha invitado a Miguel Fernández y a los esperantistas interesados. Nos vemos allí.

## DISKO “ESPERANTO”

Cronómetrobudú estas hispana muzikbando, naskiĝinta en Burgoso kaj kun granda sukceso en Meksikio, kiu kombinas rokajn ritmojn kun tre diversaj melodistiloj, kaj kiu ĵus eldonis sian sesan diskon, kun nomo “Esperanto”. Por tiu ĉi disko la bando petis helpojn de la esperantista movado, kaj ties frukto estis la enkonduko de temoj rilataj al nia lingvo. La plej elstara estas la partopreno de Miguel Fernández en unu el la pecoj, per la deklamado de “Ho, mia kor’”.

La disko estis jam prezentita en Meksikio, kaj tre baldaŭ oni tion faros ankaŭ en Hispanio: la 1an de oktobro en la koncertejo “Hangar” de Burgoso, kaj la 5an de novembro en “Moby Dick” de Madrido. Por la premiero la bando invitis Miguel Fernández kaj la esperantistojn interesitajn. Ni tie intervidiĝos.




## ACTUALIZACIÓN DE INFORMES SOBRE CURSOS

En este inicio de curso aumenta el número de

## ĜISDATIGO PRI KURSOJ KAJ GRUPOJ

Nun kiam komenciĝas la akademia jaro, venas demandoj pri kursoj ĉeestaj en kluboj, asocioj

consultas sobre cursos de esperanto presenciales, en asociaciones u otros lugares. Por esta razón, HEF desea actualizar la página correspondiente en nuestra web esperanto.es o al menos, disponer de una lista de tales cursos para los interesados. Si alguno de los receptores organiza un curso o está relacionado con él, puede enviar los onformes a la dirección kurso@esperanto.es.

También recordamos que existe un mapa internacional de cursos de esperanto, para las personas que buscan en la red, en la dirección edukado.net. Dado que el número de cursos que están reflejados ahí, de los celebrados en España, es muy inferior a los reales, los responsables han realizado un llamamiento para completarlo.

Además, la Federación está actualizando su lista de clubes y asociaciones esperantistas en España, para informar a las personas que buscan por la Red. Controlad en http://www.esperanto.es/hef/index.php/grupos-en-espana e informad a la Federación si existe algún error o modificación. Recordamos que cualquier esperantista, independientemente de si participa en un grupo o no, puede introducir sus datos en el mapa creado en http://bit.ly/mapaESeo para encontrar otros colegas.

kaj aliloke. HEF deziras aktualigi la korespondan paĝon en esperanto.es aŭ almenaŭ havi liston de tiaj kursoj por demandantoj. Se iu el vi gvidas, organizas aŭ rilatas al kurso, bv. sendi viajn informojn al kurso@esperanto.es.

Ni memorigas ankaŭ ke ekzistas internacia mapo de kursoj, por homoj serĉantaj en la reto, ĉe edukado.net. Ĉar evidentiĝas ke la nombro de kursoj tie aperantaj estas multe pli malalta, kompare kun la realo, la respondeculoj faris alvokon kompletigi ĝin.

Krome, HEF aktualigas ankaŭ siajn paĝojn pri adresoj de la lokaj grupoj kaj asocioj, cele informi novulojn venantajn ĉefe el reta lernado aŭ sociaj retoj. Bv. kontroli la datumojn ĉe http://www.esperanto.es/hef/index.php/grupos-en-espana kaj sciigi nin pri ĉiu novaĵo aŭ modifo.

Memoru ankaŭ ke eblas aldoni vian nomon, eĉ se en via urbo ne ekzistas organizita grupo, en la mapo de esperantistoj ĉe http://bit.ly/mapaESeo por trovi aliajn samideanojn.

